

Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 474, 1972.11.08 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la jaro 1969 kreigis en Svislando Kultura Centro Esperantista. Ni jam havis plurfoje la okazon raporti pri la laboro de tiu Centro, kies sekretario mi estas. Ĝi vivas de la donacoj de la esperantistoj kaj de la esperanto-simpatiantoj.

A.- La 12-an de novembro okazos en la urbo Biel-Bienne grava kunveno, kiu devos decidi pri nova trijara labor-programo, tio por la periodo 1973-1976. Estas malfacile prezenti tiun 5-paĝan tekston en kelkaj minutoj. Tamen ni provos diri kelkajn vortojn pri ĝi.

Cl.- Unua ĉapitro listigas la fundamentajn agadojn. Ili celadas antaŭ ĉio la informadon de la publiko pere de inform-folioj pri la nuna disvolviĝo de esperanto, kiuj estas senpage je la dispono de la personoj, societoj, lernejoj, movadoj kaj partioj, kiuj deziras kunlabori al la diskonigo de esperanto.

A.- Sur tiuj inform-folioj estas proponata dokumentujo pri esperanto, kiu enhavas detalajn informojn pri esperanto, pri la societoj, pri la venontaj renkontiĝoj, prospektojn, specimenojn de gazetoj, la unuan lecionon de perkoresponda kurso por franclingvanoj.

Cl.- Preleg-materialo kun lumbildoj estas je la dispono de ĉiuj, kiuj havas la eblecon organizi paroladon pri esperanto.

A.- Nacilingvaj informiloj estas dissendataj al la lernejoj, al la registaraj instancoj, al politikistoj, ĵurnalistoj kaj al la esperanto-gelernantoj.

Cl.- Pergazeta informado provas garanti la regulan nutradon de esperanto-rubrikoj en gravaj gazetoj kaj rebat-servo celas respondi al mensogaj informoj.

A.- Tiuj fundamentaj agadoj jam pli malpli funkcias dank'al la kunlaboro de multaj personoj. Kultura Centro Esperantista deziras povi ilin plenumadi en la tri lingvaj regionoj de Svislando, kio ne estas eta afero.

Cl.- La dua ĉapitro listigas la servojn, kiujn Kultura Centro Esperantista alportas al la esperantistoj.

A.- La libro-servo jam bone funkcias. Korektada servo bone funkcias en franca Svislando. Ekzamena Komisiono devas esti starigita. Restadoj, seminarioj, kursoj, renkontiĝoj estas organizataj. Ni havis la okazon raporti pri la Kulturaj Semajnfinoj Esperantistaj, kiuj okazas en la printempo kaj en la aŭtuno en Renens apud Lausanne.

Cl.- La Skiferio, kiu okazas ĉiuvintre en Adelboden havas internacian karakteron.

A.- La tria ĉapitro avertas, ke Kultura Centro Esperantista kunlaboras kun ĉiuj esperantaj kaj neesperantaj societoj laŭ precizaj kunlabor-principoj.

Cl.- Fine la kvara ĉapitro listigas la celadon de Kultura Centro Esperantista. Nur kiam la fundamentaj agadoj kaj la servoj kontentige funkcios, estos eble transpaŝi al tiuj pli altnivelaj celadoj. Sed tio ne malhelpas nin jam nun planadi ilin.

A.- Unu el tiuj celadoj estas la starigo de Somera Gimnazio. Jen la kursoj, kiuj devus troviĝi en la instruplano de tiu Somera Gimnazio : Kursoj pri esperanto kaj pri ties historio, kiuj kondukas al la akiro de la ĉisekvaj diplomoj : elementa diplomo, meza diplomo kaj supera diplomo. Kursoj pri la historio kaj la literaturo de esperanto. Kursoj pri lingvistiko kaj interlingvistiko. Kursoj pri la instruado de esperanto, kiuj kondukas al la akiro de pedagogia diplomo. Kursoj en esperanto pri la internacia vivo socia, jura kaj scienca kaj pri la temo interpopola konduto. Kursoj en esperanto pri plej diversaj fakoj, tio laŭ tutmonda vidpunkto.

Cl.- Alia celado : Perkorespondaj kursoj de esperanto kaj ties literaturo, kiuj kondukas la lernantojn al la akiro de la ĉisekvaj diplomoj : elementa diplomo, meza diplomo, supera diplomo kaj pedagogia diplomo.

A.- Tiuj perkorespondaj kursoj estas necesa komplemento al la starigota Somera Gimnazio.

Cl.- Alia celado estas la eldonado de multobligitaj kajeroj sub la titolo *Studoj*. En tiuj kajeroj povos aperi la studoj kaj serĉlaboroj de la esperanto-klerularo. Ili estas alia komplemento al la starigo de tiu Somera Gimnazio.

A.- Tiu laborplano difinas, kiel estos financitaj tiuj diversaj punktoj. Estas antaŭvidate, ke Kultura Centro Esperantista organizos tiun Someran Gimnazion, nur kiam ĝi estos certa je financa kaj morala apogoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!